- d) los ingresos que obtenga la Asociación mediante las actividades lícitas que acuerde realizar la Junta Directiva, siempre dentro de los fines estatutarios.

31.-La administración de los fondos de la Asociación se llevará a cabo sometida a la correspondiente intervención y con la publicidad suficiente, a fin de que los socios puedan tener conocimiento periódicamente del destino de los fondos sin perjuicio del derecho consignado a este respecto en el apartado e) del artículo 27 de estos Estatutos.

32.- En caso de disolverse la Asociación Andaluza de Esperanto, la Asamblea General que acuerde la disolución nombrará una comisión de 3 miembros extraídos de los de la Junta Directiva, la cual se hará cargo de los fondos para que, una vez satisfechas las obligaciones el remanente, si lo hubiere, sea entregado a la Federación Española de Esperanto, para que los dedique a iguales, o en su defecto, análogos fines a los de la Asociación Andaluza de Esperanto.



## LEY DE ASOCIACIONES

### *Artículo 7. Estatutos.*

1. Los Estatutos deberán contener los siguientes extremos:

- a) La denominación.
- b) El domicilio, así como el ámbito territorial en que haya de realizar principalmente sus actividades.
- c) La duración, cuando la asociación no se constituya por tiempo indefinido.
- d) Los fines y actividades de la asociación, descritos de forma precisa.
- e) Los requisitos y modalidades de admisión y baja, sanción y separación de los asociados y, en su caso, las clases de éstos. Podrán incluir también las consecuencias del impago de las cuotas por parte de los asociados.
- f) Los derechos y obligaciones de los asociados y, en su caso, de cada una de sus distintas modalidades.
- g) Los criterios que garanticen el funcionamiento democrático de la asociación.
- h) Los órganos de gobierno y representación, su composición, reglas y procedimientos para la elección y sustitución de sus miembros, sus atribuciones, duración de los cargos, causas de su cese, la forma de deliberar, adoptar y ejecutar sus acuerdos y las personas o cargos con facultad para certificarlos y requisitos para que los citados órganos queden válidamente constituidos, así como la cantidad de asociados necesaria para poder convocar sesiones de los órganos de gobierno o de proponer asuntos en el orden del día.
- i) El régimen de administración, contabilidad y documentación, así como la fecha de cierre del ejercicio asociativo.
- j) El patrimonio inicial y los recursos económicos de los que se podrá hacer uso.
- k) Causas de disolución y destino del patrimonio en tal supuesto, que no podrá desvirtuar el carácter no lucrativo de la entidad

2. Los Estatutos también podrán contener cualesquiera otras disposiciones y condiciones lícitas que los promotores consideren convenientes, siempre que no se opongan a las leyes ni contradigan los principios configuradores de la asociación.

3. El contenido de los Estatutos no podrá ser contrario al ordenamiento jurídico.

=====

## **ASAMBLEA GENERAL EXTRAORDINARIA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO**

### ***Convocatoria***

Como presidente de la Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, convoco a todos los miembros de esta asociación a participar en la Asamblea General Extraordinaria que se celebrará el día 21 de febrero de 2.004, a las 11 horas, en el Bar del Puerto de Málaga.

**Orden del Día:**

- 1.- Lectura y aprobación, si procede, del acta de la reunión anterior.**
- 2.- Modificación de los Estatutos de la asociación.**
- 11.- Ruegos y Preguntas.**

**Málaga, 4 de febrero de 2.004**

**Firmado: Andrés Martín González, Presidente de Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.**

---

### **AUTORIZACIÓN**

**Autorizo a** \_\_\_\_\_  
**miembro de Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo para que me represente y vote en mi nombre las propuestas que se presenten en la Asamblea General Extraordinaria que se celebrará en el Bar del Puerto de Málaga el día 21 de febrero de 2.004.**

**a** \_\_\_\_\_ **de febrero de 2.004**

**Firmado:**

## ĜENERALA ASEMBLEO EKSTERORDINARA DE ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

### *Alvoko*

Kiel prezidanto de Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo mi alvokas ĉiujn membrojn de ĉi tiu asocio partopreni en la Ĝenerala Asembleo Eksterordinara okazonta la 21an de februaro 2004 en Bar de Puerto de Málaga, je la 11-a horo.

### *Tagordo*

- 1.- Legado kaj aprobo, se dece, de la akto de la antaŭa kunveno.
- 2.- Modifo de la Statuto de la asocio.
- 3.- Petoj kaj demandoj.

Málaga, 4-an de februaro 2004

Subskribis: Andrés Martín González, Prezidanto de Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

---

### RAJTIGILO

Mi rajtigas ,  
membro de Asociación Andaluza de Esperanto/Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, reprezenti min kaj voĉdoni je mia nomo la proponojn prezentotajn en la Ĝenerala Asembleo Eksterordinara okazonta en Bar de Puerto de Málaga la 21-an de februaro 2.004.

, -an de februaro 2.004

Subskribis:

## Ĝangalo por komencantoj

Ekde la lanĉo de Ĝangalo, ĝia administracio ĉiam deziris, ke la portalo Ĝangalon servu kiel eble plej multaj esperantistoj. Kelkaj tamen ne povis ĝui Ĝangalon komplete, pro tio, ke tiuj ankoraŭ ne ellernis la internacian lingvon. Komencantoj fakte uzis la portalon por lerni, sed mankis pli taŭga formato por tiuj, kiuj eklernas la lingvon, aŭ tiuj survoje ĝin regi. Por tiuj personoj la administracio lanĉas 'Ĝangalon por Komencantoj', la plej nova angulo por la freŝe bakitaj esperantistoj.

La portalo 'Ĝangalo por Komencantoj' estas je multaj manieroj malsama al tiu, kiun oni kutimas sin turnas, kiam oni volas scii, kio okazas en la mondo, per la internacia lingvo. En 'Ĝangalo por Komencantoj', ĉiun monaton estos novaj noticoj, tekstoj, muzikoj, eksplikoj, tabeloj kaj bildoj, tiel ke ĝi fariĝos nemalhavebla al ĉiu persono, kiu eklernos Esperanton, per interreto aŭ en klasĉambroj.

Por garantii ĝian internaciecon, la tuta portalo prezentiĝas en Esperanto, kun facilaj klarigoj pri la maloftaj vortoj kaj neordinaraj gramatikaj punktoj. 'Ĝangalo por Komencantoj' estas la plej ambicia paŝo de la administracio de la portaloj de Ĝangalo, ne nur pro ĝia noveco en la reto, sed precipe, ĉar ĝi estos la unua portalo en interreto, kiu estos abonebla.

Fakte, dum la monato septembro, la administracio lasos libera la vizitadon de 'Ĝangalo por Komencantoj', sed de oktobro, ĉiu, kiu volas legi ĉiumonate la novaĵojn en la portalo por komencantoj devos ĝin aboni, per kreditkarto (tutsekura sistemo 'PayPal') aŭ per ĝiro en la UEA-konton de Ĝangalo (ĝan-v). Estas du opcioj de abono - semestra (ses monatojn), por 18 eŭroj, kaj jara (12 monatojn), por 35 eŭroj (estas rabatoj por triamondanoj - informiĝu ĉe ni). La abonoj kovros la kostojn de la ellaborado de la portalo, kiu, malgraŭ kontraŭaj ŝajnoj, postulis de la administracio la dungon de plia laboristo. Ni reliefigu, ke la notico-portalo Ĝangalo (<http://ĝangalo.com>) daŭre restos tute senpaga.

Temas pri revolucia koncepto en Esperantio - ne nur lanĉis Ĝangalo la unuan retmagazinon por komencantoj, sed ankaŭ prezentiĝas la defio atingi almenaŭ 50 abonantojn ĝis novembro. Se ĉi tiu nombro ne estos atingita, la portalo ĉesos ekzisti, kaj la mono de tiuj (individuoj kaj kluboj), kiuj abonis ĝin intertempe, estos redonita. Ĉu la interreta verdularo estas jam sufiĉe matura por profesia servo, kaj konsekvence, profesia rilato (bona servo = ĝusta pago)? Nur la estonto verdiktos. de Ĝangalo-redakcio

fonto: ret-info

<http://www.eventoj.hu>

## MANIFESTO DE RAŬMO (1980)

### 1. Krizo de identeco

La subskribintoj konstatis kontraŭdiron en la sinteno de la esperantistaro, kvazaŭ konflikton inter idea superego kaj ego: nia superego igas nin prediki al la aliaj homoj pri kelkaj mitoj –la dua lingvo por ĉiu; la angla lingvo estas nia malamiko; UN devas adopti Esperanton; ktp- kaj laŭdegi la lingvon eĉ ne objektivite okaze de intervjuo; samtempe, inter ni, ni ĝuas kaj aplikas Esperanton laŭ tio kio ĝi efektive estas, sendepende de la praelaj sloganoj. Tio ja estas krizo de identeco, kaj ni sentas la neceson motivi nian esperantistecon per io pli kohera.

### 1. Kritiko de prceloj

Ni kredas ke:

- a) la oficialigo de Esperanto estas nek verŝajna nek esenca dum la 80-aj jaroj - oni havu alternativajn celojn;
- a) la faligo de la angla lingvo estas nek tasko nek zorgo de la esperantistoj: finfine la angla rolas nur kiel *helplingvo*, analoge al la franca siatempe (eĉ malpli grave ol iam la franca mem); Zamenhof neniam proponis al la E-movado kiel celon kontraŭstari la francan, ĉar por Esperanto li antaŭvidis pli valoran alternativan rolon.

### 1. Niaj celoj

Ni celas disvastigi Esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi pozitivajn valorojn:

- a) propedeŭtiko por lingvoinstruado;
- a) kontaktoj inter ordinaraj homoj;
- a) kontakto sendiskriminaciaj;
- a) novtipa internacia kulturo.

Lige kun la lasta valoro, ni emfazas ke la ŝerĉado de propra identeco igis koncepti esperantistecon kvazaŭ la apartenon al mem elektita diaspora lingva minoritato. La kresko de niaj fortoj kaj la aliĝo de novaj homoj estas nepre kondiĉitaj de la konsciigo pri tiuj ĉi valoroj.

---

Esta es la página de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.

<http://www.andalucia-esperanto.tk>

---

## 1. La kongresoj kiel vojo al kresko

Internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas esencaj por la asimiliĝo de homoj al nia lingva komunumo: necesas unuflanke kongresi pli ofte inter ni, kaj rezervi la kunsidadon de gvidorganoj al apartaj funkciulaj kunvenoj, laŭ la modelo de la TEJO-seminario en Strasburgo (junio 1980), kaj aliflanke necesas fortigi la uzon de Esperanto kiel laborlingvo en fakaj konferencoj internaciaj, laŭ la modelo de la Freinet-instruistoj.

## 1. Ni posedas formon kaj enhavon

Ni kredas ke la unua jarcento de Esperanto pruvis la taŭgecon de la lingvo por esprimi *ĉion*; meze de la 80-aj jaroj, komence de la dua jarcento, ni devos ekmontro al la mondo ke ni kapablas ankaŭ diri *ion* – *ion* - kulture originalan kaj internacie valoran.

---

## PROKLAMO DE VOSS (1991)

### Esperanta kiel funkcia lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcia lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajtojn, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demoktatiĝo de la komunikado.

### Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas de si mem, ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.



## Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajton de la minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu nenian specifan lingvon – naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco.

Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

## Esperanto – ĝia destino

La tradicia termino “fina venko” kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikon. La plukreo de aŭtonoma Esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj finvenkemaj esperantistoj estas transpontebla – ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori. Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de Esperanto ne okazos:

- sole per la klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek la rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;
- sen la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastiĝantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭa “fina venko” povas naski frustrajn, certe iel forigendajn, estu tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion farinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj kiuj malfermus la vojon al tio.

La nuna tasko estas krei tiujn antaŭkondiĉojn, kies manko aŭ malforto bremsus Esperanton en la koncerna momento ĉe transiro al tiu vast-skala uzado.




---

Esta es la página de AEÜ. Visítala y recomiéndala a tus amistades.

<http://www.andalucia-esperanto.tk>

---

## **PROKLAMO DE POZNANO**

### **Proklamo pri elcerpiĝo de la paradigmo finvenkismo-raŭmismo**

Ni, sube subskribintaj partoprenantoj de la XIX-a ARKONES en Poznan,

rekonante

ke la koncepta paro finvenkismo-raŭmismo estas unu el la plej sterilaj neologismoj de la esperanto-movado en la lasta kvaronjarcento, ke dokumentoj kritike opiniantaj pri ĝi restas nerimarkataj, kiel la Proklamo de Voss el 1991, kiu diras ke ... konflikto inter kultur-flegemaj kaj fin-venkemaj esperantistoj estas transpontebla...,

konstatinte

ke finvenkismo kaj raŭmismo, se entute nomi ilin tiel, kunlogas en ĉiu el ni, ke la gisnuna praktiko uzi ĉi tiun pensokadron evidente pruvis ties falsecon, dogman, valorpritaksan karakteron, malantaŭ kiu troviĝas vulgare ideologia pensadmaniero,

ke la koncepta paro damaĝas la rican bildon de ideologioj ligitaj kun la esperanta movado, ĉar ĝi devigas pensi nur pri du el ili, kvankam ekzistas tiaj historiaj ideotendencoj kiel: laborista movado, kristanisma socidoktrino, novaj sociaj movadoj, ideologio de hobiismo - ĉiu el ili elemento de riĉeco de la esperanto-kulturo,

rekomendante

al ĉiu esperantisto, kiu ne kutimas trakti mitojn kiel faktojn

proklamas

elcerpiĝon de la paradigmo finvenkismo - raŭmismo!

Detlev Blanke

Tadesz Chrobak

István Ertl

Zbigniew Galor

Georgo Handzlik

Pawel Janowczyk

Zbigniew Kornicki

Ilona Koutny

Poznan, 27.09.2003.



## Komercaj petoj kaj proponoj

### *Brazilo*

Mario Fonseca, Caixa Postal 10822, 70324-980 Brasilia - SCS - DF, anoncas aktualan retadreson [paradizo@novamondo.net](mailto:paradizo@novamondo.net) kaj TTT-ejon: [www.NovaMondo.Net](http://www.NovaMondo.Net) (ankoraux nur portugale).

### *Ĉinio*

Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, registrita ĉe la Internacia Industria kaj Komerca Administra Buroo, estis fondita je la jaro 1996.

Nia kompanio ĉefe produktas kudra-pintajn kovrilojn de sofo kaj seĝo. La kompanio estas unu el la plej grandaj fabrikoj kiuj eksportas la sofarojn; estas ankaŭ fabriko kiu produktas la plej multe da sofaroj kun eta pinto en Ĉinio. Ni iutempe ankaŭ komercas je aliaj kudra-pintaj produktajoj kaj brodaĵoj, ekzemple: tablobrodaĵoj, tapiŝoj ktp. Ĉiuj el niaj produktajoj estas eksportataj al fremdlandoj, ekzemple: Egipto, Saŭdi-Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj, ktp.

Nia kompanio situas en kvartalo de la urbo Yantai, kiu najbariĝas ĉe Bohai-marĝo kaj posedas avantaĝan geografian pozicion. La haveno de Yantai havas liniojn al multe da landoj kaj regionoj; la flughaveno estas facila al la grandaj urboj en nia lando. Ni varme invitas geamikojn en- kaj eksterlandajn viziti nian kompanion por negoco, kunlaboro kaj amikaj rilatoj.

Direktoro: Wang Cheng-zhi; Yantai-a Verd-stela Arta Kompanio Limigita, No.89-5-1 Huanshan-strato, Yantai, Ĉinio; rete: [greenstar@163169.net](mailto:greenstar@163169.net), telefono: 0086-535-6605088 kaj 0086-535-6170665; fakse: 0086-535- 6605088

### *Togolando*

Nun komerci kun Afriko estas ebla! Ni estas togolandaj esperantistaj komercistoj legale bazitaj en la haveno de Lom, la ĉefurbo de Togolando. Ni vendas artikolojn senditajn de Eŭropo (veturiloj, kamionoj, radioriceviloj, komputiloj, televido, man-telefonoj, ktp.) Kontakto nin, ni diskutu pri la kondiĉoj. Alves Klement, rete [expedition017@yahoo.com](mailto:expedition017@yahoo.com), Lom, TOGO.

---

Esta es la pàgina de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.

<http://www.andalucia-esperanto.tk>

## Peto pri la Esperanta Civitaneco

**Al establo**

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**

**Armengual de la Mota 33 -4º - D**

**29007 Malago**

**Hispanio**

**Estimataj,**

Laŭ la artikoloj 9 kaj 25 de la Konstitucio, bonvolu peri al la Civitana Registaro mian peton pri la esperanta civitaneco.

Se mia peto estas akceptita, mi konsentas disponigi al la matrikulisto la necesajn datumojn.

**Dato:**

**Subskribis:**

**Adreso**

---

### Personaj necedeblaj rajtoj

1. La Deklaracio konsideras personaj necedeblaj rajtoj aplikeblaj en ĉiuj kazoj:
  - la rajton esti rekonata kiel membro de lingva komunumo;
  - la rajton uzi sian lingvon, private kaj publike;
  - la rajton je la uzo de sia propra nomo;
  - la rajton kontakti kaj asociigi kun aliaj membroj de sia origina lingva komunumo;
  - la rajton konservi kaj disvolvi sian propran kulturon;kaj la ceterajn rajtojn ligitajn al la lingvo, antaŭviditajn en la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, je la 16a de decembro 1966, kaj en la samdata Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.

(Artikolo 3 de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj)

## ESPERANTA CIVITO

### SOLIDARECO AL KEP ENDERBY

Eble la interesa gazeto "La Ondo de Esperanto" lanĉis lastatempe novan konkurson, pri "la kretenaĵo de la jaro". Ĝin gajnis tute certe la bullerisma aŭtoro Komitatano Z, kiu en la decembra numero 2003 skribis tiele: "ia ĵaluzo de la movade novica Enderby kontraŭ Buller, kiu deĵoris en Roterdamo jam antaŭ ol la prezidanto eklernis la lingvon, venene influis la rilatadon ne nur inter ili du sed fine ankaŭ inter la estraro kaj Centra Oficejo [de UEA] ĝenerale".

Sciante ke la purigistino ekdeĵoris en la sama CO kelkajn jarojn pli frue ol Osmo Buller (do eĉ pli frue ol s-ro Enderby eklernis nian lingvon), ĉu laŭ la logiko de Komitatano Z oni devus konkludi, ke plia ĵaluzo eĉ pli venene influis la rilatadon ne nur inter aŭstralia eksministro kaj roterdama purigistino, sed eble ankaŭ inter la tuta Komitato de UEA kaj Unesko ĝenerale...?

La redakcio de HeKo esprimas sian plenan solidarecon al s-ro Enderby, viktimo de la kalumnio de Komitatano Z en "La Ondo de Esperanto".

Cetere ni konstatas, ke ĉe Komitatano Z la Estraroj kaj Prezidantoj skribiĝas minuskle, dum centraj oficejoj kaj ĝeneralaj direktoroj majuskle (hazardo [?] la saman grafion oni uzas en la gazetaraĵ komunikoj el Roterdamo).

HeKo

### SIMPTOMO DE GRANDA MALFORTO

Osmo Buller, 55-jaraĝa finna ŝtatano, el la norda provinco de Oulu, reiros gvidi la centralon de UEA en aprilo 2004. Jam en la 1970aj esperantisto flue parolanta, sed malaktiva en la movado, Buller oficis kiel profesia funkciulo de la loka komunista partio. En la 1980aj li esperis labori kadre de la finnlingva redakcio de Radio Polonia (tiam gvidata de Andrzej Pettyn), sed eksteraj cirkonstancoj malhelpis la projekton. Tiam li sukcesis dungigi ĉe la centra oficejo de UEA, kaj komencis sian karieron ĝis la posteno de direktoro (neniam estinte manaĝero).




---

**AEU tiene la "civitaneco". Tu puedes pedirla individualmente, para ti, a través de la asociación.**


UEA, daŭre aksita sur konstanta funkciularo koncentrita en unu loko, strukture paneis en 2003 -- la Estraro, kiu sukcesis en 2001 limigi la povon de la burokrataro, ree bezonas ĉefburokraton. Tial la redungo de s-ro Buller estas simptomo de granda malforto.

Fakte per tiu redungo la interna multjara konflikto eniris novan fazon. Kerna elemento en tiu nova fazo estas la konkludo en la oficiala gazetara komunikilo. "La estraro fidis la promeson de Osmo Buller plene sin dediĉi al harmonia organiza laboro kaj al senkondiĉa antaŭenigo de UEA kaj la Esperanto-movado". Do la Estraro ŝajnas supozi sub sia kontrolo la ĉefan internan opoziciananton, kiu estus ligita de "promeso".

Pri tiuj reciprokaj promeso kaj fido Komitatano Petrovic el Serbio saĝe komentariis: "Mi volas akcepti ĝin kun plena fido, kaj mi bone memoros ĝin." Ĉar se iu ne respektos ĝin, kio okazos?

## INSTITUTO ZAMENHOF BALDAU EN LA RETO

Nova diskutlisto rantio.net baldaŭ scienca Instituto de la Esperanta Cielo. La prezidanto de François Degoul, unua cirkulero al menhofologio. Se HeKo troviĝas za- (aŭtoroj de artimenhof), kiuj hancirkuleron, ili bonla redakcio de interesigon al la tuto.



en la domajno Esperantofunkcios serve al la Zamenhof, agnoskita vito.

la Instituto, c-ano utiligos tiun liston por la interesatoj pri zamenhofologoj kolo aŭ eseo pri Zamenhofe ne ricevos tiun volu rekte turni sin al HeKo, kiu peros la prezidanto de la Instituto.

Ankaŭ en [www.esperantio.net](http://www.esperantio.net) konstruiĝas paĝaro por la Instituto, kun prezento pri ĝiaj celoj kaj aktiveco, kaj kun enretigo de zamenhofologiaj eseoj.

HeKo

## SAT APREZAS LA KONTAKTON KUN LA ESPERANTA CIVITO

Demandite de Kalle Kniivilae pri la rilatoj inter SAT kaj UEA, Jakvo Sc.hram lastatempe respondis:

"Kiel nova prezidanto de la Plenumkomitato de SAT, mi esperis tuj havi bonan kontakton kun UEA kaj eventuale havi komunan kunsidon kun la estraro aŭ kelkaj estraranoj de UEA. Ĝis nun ni ne sukcesis kvankam tio laŭ mi facile estas realigebla.


"Certe ekzistas punktoj je kiuj UEA kaj SAT povas kunlabori, sed ni minimume devas havi kunsidon por diskuti tion. SAT ankaŭ montras sian amikecon al UEA sur la unua pago de nia TTT-paĝo kie oni jam trovas ligan al UEA. Inverse oni kapablas silenti pri SAT kiel eble plej lerte, kio estas bedaŭrinda. SAT kaj UEA ne estas konkurantoj sed komplementoj unu al la alia.

"Kun ekzemple la Ci-  
mitato de SAT jam  
en kiu ni povis montri  
kaj dezirojn. La Ci-  
ĉiam volas kunlabori  
asocioj kiuj respektas  
de SAT.

"Tiuj kiuj revas pri  
du asocioj (UEA kaj  
sed bedaŭrinde por ili  
la estontaj jaroj. Mi  
generacio de SAT-  
mi, neniam akceptos  
sendependa kaj memstara."

(Rimarko: la tuta SAT-kongreso 2003 neniom estis menciita en la organo de UEA, escepte de kelkaj linioj pri la inaŭguro de Esperanto-strato).

HeKo



vito la plenumko-  
havis kunsidon,  
niajn gvidliniojn  
vito scias ke SAT  
kun demokratiaj  
la sendependecon

kunfandiĝo de la  
SAT) plu revu,  
tio ne okazos en  
pensas ke la nuna  
membroj, ĉekape  
SAT kiu ne estas

---

Esta es la pàgina de AEU. Visítala y recomiéndala a tus amistades.

<http://www.andalucia-esperanto.tk>

---

## TUS CUOTAS DE SOCIO

**Ingres**a tu cuota de socio en cualquiera de estas cuentas bancarias de la Asociación Andaluza de Esperanto e informa de ello a la Directiva por correo normal o electrónico:

**En BBVA:** 0182 4106 71 0207160 717

**En Caja General de Ahorros de Granada:**

2031 0225 54 0100187657

**La cuota anual de socio para el año 2.003 es de 15 euros.**

*También puedes domiciliar el pago de la cuota. Para ello, si no tienes inconveniente, rellena la siguiente autorización e informa de ello a la Directiva de la asociación, así como a la entidad bancaria donde quieres que se abone el recibo correspondiente.*

=====

**Sr. Director de**

**Sucursal**

**Le ruego carguen en mi cuenta corriente/libreta de ahorros los recibos correspondientes a mi cuota de socio de la Asociación Andaluza de Esperanto que ésta le presente al cobro.**

**El código completo de mi cuenta es:**

**Entidad Oficina o Sucursal D.C.**

**Nº de cuenta**

**, a de**

**de 2003**

**Firmado:**

**NIF:**

**Dirección:**

**Dirección del Banco/Caja:**

**BALANCE**

(Año 2003/Jaro 2003a)

***Ingresos/Enspezoj***

Cuotas/Membrokotizo	1.037,60 €
Intereses/Rentumoj	4,86 €
Enseñanza/Instruado	31,30 €
Asamblea/Asembleo	15,20 €
Total/Entute	1.088,96 €


***Gastos/Elspezoj***

Fotocopias/Fotokopioj	155,48 €
Retenciones/Deprenoj	0,73 €
Comisiones/Komisi-pagoj	15,16 €
Gastos Bancarios/Bankaj elspezoj	17,79 €
Correos/Poŝto	95,49 €
Publicaciones/Eldonaĵoj	107,00 €
Reintegro de Lotería/Repago de bilet-prezo	97,20 €
Papelería/ Papervendejo	4,50 €
Asamblea/Asembleo	30,08 €
Total/Entute	523,43 €

Ingresos-Gastos/Enspezoj-Elspezoj	565,53 €
-----------------------------------	----------

Saldo 31-12-2002	6.182,40 €
------------------	------------

Saldo 31-12-2003	6.747,93 €
------------------	------------



**ESPERANTO  
DE TODOS Y PARA TODOS**

